# LA PACDEFENDANTO

N-o.51. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ČEHOSLOVAKIO Marto 1956

## NE EBLAS FORGESI LA TERUROJN DE LA FAŠISMO

De post 1939 pasis jam 17 jaroj kiam la 15.de marto perforte enpenetris nian patrolandon trupoj de germanaj fašistoj. Kvankam Čehoslovakio tiam havis kontraktojn kun Francio kaj Britio, ties registaroj rompis la fidelon kaj donis al Hitler permeson por libera agado. La angla Lordo Runciman tiam en Muncheno subskribis la verdikton kontraŭ la malfeliča Čehoslovakio kaj poste subite la germanaj fašistaj hordoj okupis nian landon. Post sesjara turmento kaj senlima teruro kies viktimoj farigis pli ol 25.000 da plej bonaj gefiloj de nia patrio, kiuj estis mortturmentitaj en germanaj karceroj, koncentrejoj kaj venenigitaj en gasejoj, ne eblas forgesi, kion al nia popolo alportis la fašismo kaj des pli necesas hodiaŭ atenti la agojn de la novaj militinstigantoj, kiuj denove kuragas minaci la homaron per ankoraŭ pli efikaj terurajoj - la atom kaj hidrogenbomboj.

Por reveki la konsciencon de čiuj niaj legantoj, ni či sube prezentas interkorespondadon de du kontraŭfašistaj batalintoj, kiuj malantaŭ la batalfrontoj tragpertis kaj transvivis la terurajojn:

"Riga la 16.2.56

Kara kamarado!

Mi petas pardonu min, kiam mi al vi skribas či leteron. Mi legis vian leteron al mia filo Arvedo - Mi legis kaj ploris. Nur tiu povas kompreni kaj scii, kiu mem suferis sub la jugo de la germanaj fašistoj-banditoj.

Kara amiko, mi finiris kurson kune kun mia edzo en la j.1933 kaj estis fervoraj esperantistoj, precipe mia edzo. Sed bedaurinde - sorto - germanaj fašistoj murdis lin.- En 1941 ili jetis lin en malliberejon kaj la 1-an de novembro li "mortis". Kune kun multaj aliaj kamaradoj li estis mortpafita kaj mi eč ne scias, kie li kvazaŭ hundo estas entombigita, ne kiel amata homo. Li meritus belajn florojn, sed al mi ne estas permesita tiajn meti sur lian dormlokon. Kiom malričaj kaj nesufičaj montrigas homaj vortoj en momento, kiel estas la nuna.-Mia edzo Karlo estas for, neniu povas lin revenigi. Li estas morta, sed lia ideo vivas por helpi al liaj posteuloj kaj amikoj. Eble lia morto ne estis vana, Eble li per sia morto donis forton al multaj aliaj. Do ni nun povas fari nenion alian por nia kara amiko ol deziri al li: dormu pace karulo!

Kara amiko, čiufoje mi sendas kompatajn pensojn al vi. Admirinda estas via energio, ankoraŭ labori por nia kara lingvo Esperanto. Mi tre, tre gojas. Mi legas viajn artikolojn en "La Pacdefendanto", kiom vi estas fervora. Kara amiko, kiom vi suferis fare de germanaj kanibaloj kaj spite vi restis viva kaj denove laboras kaj havas energion. Kion signifas - Forto - Laborista! -

Mi petas, pardonu miajn erarojn Mi tre erare skribas, čar mi tute forgesis nian lingvon. Dum milita tempo mi mem sidis en malliberejo kaj vi komprenas, kion signifas rigardi en la vizagon de la morto kaj sidi en malluma čambro kaj tamen mi restis viva. Do kara amiko ni tre bone komprenas unu la alian- la pasintan suferon, gi ne estas priskribebla. ./.

Mi nun laboras sur tramo kiel biletkontrolistino.Čar mi scias, ke vi estas tro okupata mi jam finas.
Kun koraj salutoj,via samideanino
Otilio VĚTRA
Tallinas ielä 58-28,
RIGA,Latv.P.S.R.,Sov-Unio."

......Kaj jen la respondo:
"Plzen,la 27.2.56
Tre estimata kamaradino!
Mi multe dankas por via sincera letero de 16.2. Via letero estas tiel bela,ke mi volas ĝin prezenti en "L.P."okaze de memorigo pri la germana Nazi-agreso al Ĉeĥoslovakio la 15-an de marto 1939,al niaj legantoj. Certe vi tion permesas.- Estas nepre necese,ke ni daŭre rememorigu al la homoj la bestialaĵojn de la faŝismo,ĉar multaj rapide forgesas kaj fariĝas oportunistaj.
Ni,la viktimoj de l'faŝismo ne povas allasi oportunismon,ĉar oni nuntempe ankoraŭ devas esti treege singardemaj,por ke la teruraĵoj ne ripetiĝu denove.Al tio devas kun ĉiuj fortoj kontribui nia kara lingvo de la paco, Esperanto!- Pro tio ni fondis la mondorganizon nomitan"MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO".
Tre gravan rolon en tiu movado povas ludi la sovjet-uniaj gek-doj,kiuj plene spertis la kruelaĵojn en la batalo j kontraŭ la germanaj faŝistoj, kaj plue la japanaj,kiuj ankaŭ spertis la militon,per kiu daŭre al ni minacas sangavidaj homaĉoj el Usono, okaze de Hiroŝima kaj Nagasaki kaj laste en Bikini. Kvankam Japanio tiam ankoraŭ staris ĉe la flanko de germanaj faŝistoj en la batalo kontraŭ la demokrataj landoj, mi tamen alte ŝatas nun la japanan popolon,al kiu la atombombo malfermis la okulojn k. kiu nun,sekve de propraj spertoj fariĝis la plej granda malamiko kaj samtempe la plej aktiva propagandisto kontraŭ la atommilito kaj ties usonaj iniciatistoj.Estas nur granda domaĝo,ke ne la tuta japana kaj sovjetaj popoloj konas nian internacian lingvon, por povi ankoraŭ pli efike diskonigi siajn spertojn kaj sian malamon kontraŭ la milito kaj la A- kaj H- bomboj al ĉiuj popoloj de la mondo kaj instigi tiujn al komuna kaj insista batalo kontraŭ la malfeliĉo,kiu denove minacas la mondon.
Kara k-dino,certe via amata edzo ne vane oferis sian vivon en la batalo kontraŭ la faŝismo, same kiel la atombombo ne vane falis sur Hiroŝimon kaj Nagasaki
La morto de tiuj herooj stariĝis pluajn milojn kaj milionojn da bravaj batalantoj sur la vakajn lokojn de hiaj karaj murditoj.
Jes, ankaŭ el tiuj memoroj konsekvas mia energio kaj entuziasmo. Mia konscienco al mi diras, ke la pacamaj popoloj,inter kiuj ankoraŭ staras"muroj de jarcentoj"- kiel diris nia kara majstro en la Esperanto-himno,kiuj baras la interkomprenon,devas nepre malaperi! Kaj mi volas esti disĉiplo de la Zamenhof-ideoj - disĉiplo de unu el la unuaj pacdefendantoj - nia kara d-ro.Zamenhof,kiun nun ankoraŭ ne sufiĉe da homoj scias adori.
Jes kara k-dino.,ofte jam ankaŭ mi ŝanceliĝis en nia batalo, renkontiĝinte kun daŭra miskompreno inter propraj kamaradoj,batalantaj por komunismo,kiuj ŝtampis nian karan lingvon"kosmopolitaĵon" kaj"kapitalistan". Kia absurdaĵo? Multaj esp-istoj, malkuraĝiĝitaj de tiu ĉi sinteno kaj timiĝitaj fariĝi objekto de persekuto,forlasis niajn vicojn, kaj sola,teninte la verdan standardon de interkomprenigo kaj paco, mi ofte preskaŭ malesperis.Sed ĉiam denove estis miaj fidelaj kunbatalantoj,kiuj per entuziasmigaj leteroj ree fortiĝis en mi la fidon je la venko de nia ideo.
Unu el tiaj multnombraj leteroj estas ankaŭ la via kaj ceteraj tre kuraĝigaj raportoj de aliaj sovjet-respublikaj gek-doj. Kaj jen nova firma volo ekpulsis tra miaj vejnoj.Mi deŝ pli kuraĝas nun batali kontraŭ la oportunismo ĉe kelkaj gvidantaj personoj rilate nian aferon. Mi jam vidas,ke la tagiĝo rapide alproksimiĝas kaj nia finfina venko kontraŭ la oportunistoj kaj malamikoj de internacia interkompreno kaj proleta internaciismo. Tiuj estas samtempe ankaŭ malamikoj de la tutmonda paco.Frue aŭ pli malfrue ili estos forblovit-

aj de forta uragano,kiu ekblovos kontraŭ ili el nia flanko.

Tre kara k-dino.mi firme kredas,ke vi kune kun via,de mi tre ŝatata filo kaj ĉiuj viaj parencoj kaj konatuloj,fariĝos ankaŭ entuziasmaj batalantoj en niaj vicoj kaj sur via posteno vi faros ĉion laŭ via eblo por kontribui al la fina kaj sukces-plena venko de nia ĝusta kaj honesta afero.

Kun plej sinceraj pacsalutoj, tute via

Rud.BURDA

## LA EKLEZIO ĈEĤOSLOVAKA KONTRAŬ LA ATOM-MILITO

Episkopo de la Ĉeĥoslovaka Eklezio,s-o.Arnošt ŜIMŜIK sendis al la regiona konferenco de pacdefendantoj,okazinta la 3/3. en Plzen,jenan leteron:

„Permesu,karaj amikoj,por ke mi,ne povanta pro malsano partopreni vian konferencon,vin certigu almenaŭ ĉi-maniere,ke ne nur mi,sed ĉiuj eklezianoj en mia diecezo staras klare kaj malkaŝe sur jena vidpunkto: Senarmigon kaj malpermeson de atomaj kaj nukleaj armiloj !

Laŭ nia kristana sentado ni kondamnas la abomenan minacadon per uzo de atombombo.

Krimuloj kaj perfiduloj de Kristo estas tiuj,kiuj malgraŭ la teruroj de la unua eksplodo de ĉi tiu diabla armilo en Hiro-ŝima,ne hontas allasi eĉ nur penson pri ĝia denova uzo.

Mi estas kun vi en absoluta solidareco por ĉiuj viaj decidoj kaj ni eĉ ne povas fari alie. Kiam ni okaze de bapto bonvenigas novnaskitan infaneton, ni ĉiam dankas Dion por la ŝatata donaco,per kiu li ne nur la gepatrojn,sed ankaŭ la homan societon feliĉigas. Ni devus honti pro judaseco,se ni silentus al tio,kion preparas fetiĉistoj,nevidantaj pro la "ora bovido" de la kapitalo kaj sia potenco - nek Dion, nek Kriston nek la homon!

Ni kredas,ke venkos la supereca plimulto de la homaro staranta kontraŭ la uzo de la atombombo kaj batalanta por senarmigo kaj daŭra paco. Ni troviĝas en ĝi kaj estas kun ĝi.

Kun sincera saluto

Arnošt ŠIMŠÍK
Plzena episkopo de Ĉeĥosl.Eklezio
Leninova č.1,PLZEN,Ĉeĥoslovakio."

Jen plua argumento,ke la batalo por la paco estas en Ĉeĥoslovakio komuna afero de ĉiuj sinceraj homoj. Event.publikigon de tiu ĉi alvoko bonvolu sendi al nia redakcio por transdoni al la episkopo.Ankaŭ salutleterojn ni povas peri.

## ESPERANTO-TELEGRAMO AL LA XX.KONGRESO DE LA SOVJET-UNIA KOM.PARTIO

La Hungara Esperanto Konsilantaro sendis la 17.de febr.esp.lingvan telegramon al la 20.partia kongreso en Moskvo.alludante la deklaron de k-do.Hruŝĉev pri la konstantaj klopodoj de Sov-Unio por la paco kaj pri la ĉefaj direktivoj,laŭ kiuj oni devas en ĉiu direkto plivastigi la internaciajn kontaktojn kaj rilatojn,al kiuj apartenas reciprokaj-vizitoj de delegitaroj,turisma trafiko kaj studenta interŝanĝo.Laŭ la telegramo la esp-istoj ĝuste plenforte por tiuj rilatoj uzas la internacian lingvon.

Menciindaj estas jenaj frazoj el la Rezolucio,kiun la 24.de febr. aprobis la Kongreso:

"En plivastiĝo de bazoj por kunlaboro inter la landoj havos grandan rolon la progresigo de internacia komerco kaj kulturrilatoj."

"Oni devas daŭrigi aktivan politikon por plua plibonigo de interrilatoj...klopodante...plivastigi la kulturajn kaj sciencajn interrilatojn." -

"Oni devas progresigi kaj plifortigi la fratajn interrilatojn de la sovjeta popolo kun la laborantoj de ĉiu lando."

Tiuj direktivoj valoras ankaŭ por ĉiuj cet.popoloj de la mondo kaj deviĝas nin ankoraŭ pli energie partopreni per Esperanto por realigi la menciitajn celojn.

Eble rusaj k-doj povus el tiu rezolucio traduki por ni ankoraŭ pli valorajn tekstojn.

Pál BALKÁNYI
BUDAPEST

Neforgesu renovigi vian jarabonon!

## GRANDA SUKCESO EN SOV-UNIO

Do vi povas gratuli al ni, Leningradanoj: fondiĝis la unua Esperanto-sekcio en nia lando, ĉe la Domo de Kulturo de industriaj kooperativoj /la plejgranda kulturdomo en Leningrad/ Adreso: LENINGRAD, Kirovskij prospekt N.42, Esperanto-sekcio. Kunvenoj okazas ĉiu marde. La unuan partoprenis 20 gek-doj. Ili aŭskultis mian raporton pri la plej nova situacio de la Esp-movado en eksterlando kaj en Sovjet-Unio, kaj pri la proksimaj taskoj de la leningradaj esperantistoj.

Ĉiuj ĉeestantoj esprimis sian deziron, aktive kunlabori. Estis fondita ankaŭ "MEM"-komisiono, kiu funkcios kiel sekcio de la Leningrada Packomitato. Nun temas pri la laboro, per kiu praviĝi la konfidon de la Domestraro. Kaj mi ege esperas je via helpo. Nia plano konsistas el jenaj punktoj:

1./ Plej urĝe kontaktiĝi nian kulturdomon kun tiaj en la Popoldemokratioj. Trafoliuminte la numerojn de PACO kaj L.P. mi trovis kelkajn adresojn de k-doj, kiuj partoprenas Esp-laboron ĉe kulturdomoj: en Ĉeĥoslovakio, Bratislava-Tvarožek, Ostrava-Adámek, Třinec-Kohoutek; en Hungario, Budapest-Németh, Vasvár-Kondor, Békésczaba-Szemenyei; Polio, Ciesczyn-Glajcar, Stalingrad-Kulozik; DDR, Neuruppin-Schödl.

Al la supre nomitaj k-doj ni jam skribis leterojn petante ilin helpi la interligon de iliaj kulturdomoj kun la nia:

a/ sciiĝi pri konsento, b/ interŝanĝo de afiŝoj, laborplanoj, muziknotoj, leteroj de kunlaborantoj, fotoj ktp.

Se vi posedas ankoraŭ iajn adresojn de kulturdomoj kie funkcias esp-istoj, bonvolu senprokraste ilin sendi al mi. Bonvolu ankaŭ publiki la adreson de nia Kulturdomo kun alvoko skribi al ni leterojn, p.k. ktp. Se ni sukcesos en ĉi Domo ni multege helpos nian movadon en la tuta lando.

2./ ricevinte de vi sciigon, ke vi posedas ekspozicion 250 kg pezan, kiun vi volonte sendus al ni, se ne malhelpus la mona problemo, mi perdis la trankvilon. Bonvolu tuj al ni sciigi, kiom da mono vi bezonas por sendi al ni ĉi ekspozicion kaj ni aranĝos la aferon tiel, ke la leningrada packomitato petos ĉeĥoslovakan packomitaton monhelpi kaj poste la afero estos kvitita.

Pri nia sukceso ĉe la Leningrada filio de la Lingva Instituto ĉe la Akademio de Sciencoj mi jam skribis al vi, sed post semajno tie ekfunkcios rondeto kun kurso, kiun partoprenos 20 sciencLaborantoj, ĝin gvidos k-do. N. Andrejov.

La deziro aboni L.P. kreskas ĉe ni rapide. Se eblas, sendu al ni po 30 ekzempleroj.

Hieraŭ estis ĉe ni k-do. Bokarev. Ni longe priparolis la esp. aferojn. Iliaj klopodoj pri eldonado de PACO kaj sovjeta bulteno progresas. Eble propra bulteno eldoniĝos en Moskvo kaj "PACO" en Leningrad. Bonvolu informi nin pri la kvanto necesa por "MEM". Kompreneble ni sendos sovjetan eldonon de "PACO" tute senpage al "MEM" kaj tiom da ekzempleroj kiom ĝi bezonos.

via S. Podkaminer
Petropavlovskaja 4, Kv 34,
LENINGRAD-22, Sovjet-Unio.

Nia redakcio kompreneble liveros al Leningrad tiom da L.P. kiom ili mendos kaj pri la ekspozicio ni ankoraŭ intertraktas. La supran leteron ni respondis detale. Niaj legantoj antaŭ ĉio prizorgu kontakton de iliaj kulturdomoj, klerigaj societoj /Osv. Bes./ kun la Leningrada Kulturdomo kaj alsendu al k-do. S. Podkaminer la plej novajn materialojn el la Esp-paçmovado por la ekspozicio kaj ankaŭ salutleterojn. Estas nepre necese, ke per via rapida aktiva helpo vi konvinkiĝu la plej grandan Domon de Kulturo en Leningrad pri la alta valoro de la Esperanto-lingvo.

GEKAMARADOJ! la tempo kiam ni nur kvazaŭ sekcianoj babiladis esperante jam definitive forpasis! - Nun estas postulata de vi pli multe - AKTIVA LABORO PER ESPERANTO kaj POR PACO !

## 83 LERNANTOJ EN OPOLE

Laŭ sciigo de k-do. ing. Mir. Tůma el Brno, fondiĝis filio de la Asocio de Esperantistoj en Polio, en urbo Opole, kiun prezidas k-do. Kazimierz.

La grupo komencis sian agadon per varbado por kurso. ĝi atingis grandan sukceson. Al la unua kurso jam aliĝis 83 lernantoj, kiuj dilig. lernas.

UTILIGU VIAN KORESPONDADON

Ofte okazas,ke niaj ĉeĥoslovakaj gek-doj en sia korespondado ricevadas vere interesajn leterojn kun valoraj raportoj de siaj eksterlandaj amikoj.Ne multe utilas nura persona tralego kaj poste ilin konservi inter aliaj materialoj eble en sia libroŝranko.Tiaj leteroj kaj raportoj trovas multe pli grandan utiligon,se vi ilin sendos/aŭ almenaŭ kopion/ al nia redakcio por publikigi kaj disponigi ilin al ĉiuj,niaj legantoj.

Komprenu,ke multaj niaj gekdoj avide serĉas tiaspecajn raportojn,kiujn ili prezentas ne nur en siaj Esp-rondetoj,sed ankaŭ kaj ĉefe en kunvenoj de neesperantistoj,en partiaj,sindikataj, junularaj ktp.Ofte ili ankaŭ uzas tiujn raportojn por naciling-vaj gazetoj. Se vi tiajn valorajn raportojn nur por via persono utiligas kaj ne ebligas ilin prezenti al la tuto,vi faras gravan domaĝon al nia movado.

la redakcio.

"E S P E R A N T O !"

Grava internacia gazeto eldonata en Moskvo kaj aperanta en rusa,ĉeĥa,angla,franca,germana,hispana,pola,rumana,hungara kaj la sveda lingvoj sub la nomo "NOVA TEMPO" en sia eldono n-o.46/1955 prezentas raporton de angla parlamentano Emerys Hughes pri sia vojaĝo en Sovjet-Unio.Inter alie li raportas:

„Mi memoras,kiel mi unuvespere klopodis veni al iu leningrada antaŭurbo.Mi trovigis rekte en la mezo de tramvagono,premita de ĉiuj flankoj tiel,ke mi eĉ ne povis movigi. La homoj,premitaj al mi,ne sukcesis kompreni al kiu loko mi deziras veturi;tiom malbone mi esprimis ruslingve.Do mi komencis angle,poste france kaj germane,sed ĉiam sen ia sukceso. La tramo haltis kaj ĉiu el la voja̧gantoj klopodis min kompreni kaj helpi al mi.Subite iu knabino,starinta en antaŭo,ekvokis: „ESPERANTO!" Kaj jen,fine mi sukcesis klarigi,kion mi bezonis."

La plua raporto ampleksas pli ol du paĝojn,plenajn de simpatioj al Sov.Unio,sed pro manko da loko ne eblas ĝin ĉi tie publiki.Kelkajn ekz.de la revuo rezervis k-do.Reiser Jos.Nádražní č.34,PLZEŇ,kiu deziras ricevi,al -donu 1.-Kčs en leteron.

"LA PLEJ KONATAJ DEMOKRATIOJ"

En "HEROLDO DE ESPERANTO"de 1. febr.1956 vi povas legi sub la titolo"Nia Poŝto"jenan interesan respondon de ĝia redakcio:

"A.H.en K. Ni permesis al ni iom ŝanĝi la tekston de via anonceto.La esprimo"kapitalismo"havas malsaman signifon en diversaj partoj de la mondo,oni ja parolas pri privatkapitalismo kaj ŝtatkapitalismo. Ankaŭ la esprimo "demokratio" ŝanĝis sian signifon en grandaj partoj de la mondo; la plej konataj demokratioj gis nun estas la svisa,usona kaj brita." Por la esp-istoj en la landoj liberigitaj de la kapitalistaj uzurpantoj,certe ĉia komentaro estas superflua.Sed tamen necesas iomete ventumi la sufokigan aeron,kiu ankoraŭ blovas en la redakcio de "HEROLDO".

Ni serĉis la anoncon de A.H.en K. kaj trovis jenan tekston: "30jara bulgaro posedas bonajn p.m.el div.landoj,kiujn li sendos kontraŭ diversaj,sed malkaraj objektoj el nekomunistaj landoj. Aleksandr Hristov,Vlasina 47, KJUSTENDIL,Bulgario."

La anonco mem vekas imagon,kvazaŭ tiuj"malkaraj objektoj" mankus en Bulgario kaj oni devas ilin peti en "nekomunistaj landoj". Tamen ni scias,ke en Bulgario ankaŭ troviĝas multaj filatelistoj,kiuj volonte donus/se fakte temas pri bonaj p. markoj/al s-ano A.Hristov tiujn "malkarajn objektojn". Sed al ni ŝajnas,ke la redakcio de "HEROLDO" tiajn anoncetojn bonvenigas kaj sekvas per ili certajn celojn. Sed nun pri la "demokratioj":

Jes,estimata redaktoro; estas du "demokratioj",la ŝajndemokratio,t.e.demokratio nur surpapera, kaj poste la demokratio reala, fakta. Ni estas konvinkita,ke ambaŭ tiuj demokratioj estas generale kaj tutmonde konataj. Kial do diri,ke la usona,svisa kaj brita estas la plej konataj ?

Ĉu vi intencis diri,ke la plej-

multo de la homaro jam rimarkis, ke jus tiuj demokratioj estas la ŝajn-demokratioj.

Neparolante pri la svisa demokratio, kiu dum ĉiu milito devas esti "neŭtrala renkontejo", mi nur volas ĉi tie tuŝi unue la usonan demokration, kie plue regas la rasismo, kie Negroj estas senkulpe linĉataj, kie regas "Kukluksklan", kie estas infanoj venenigataj per gengster-romanoj, kie Sacco kaj Vanzetti estis murditaj sur elektra sego, kie ĉiuj homoj estas suspektataj pro "neamerikanaj tendencoj", kie oni la pacmovadon ŝtampas "komunistan" kaj persekutas, kie estas mortigit-geedzoj Rosenberg kaj el kie venis la unuaj mondkrimuloj, kiuj per la atombomboj murdis milojn kaj milojn da senkulpaj infanoj kaj virinojn en Hiroŝima kaj Nagasaki - kaj el kie oni laste eksperimentis ankoraŭ pli efikan "demokratan" amasmortigilon en Bikini - la hidrogen-bombon.

Jes, oni nomas tion "demokration" sed la plimulto jam trarigardis ĉi demokration kaj neplu volas lasi sin trompi. La brita demokratio ŝajnas esti iom pli humana, sed mi diras "ŝajnas", ĉar fakte ankaŭ la britaj kapitalistoj ne estas sanktuloj. Ili nur laboras pli hipokrite kaj ruze. Ili elsuĉas la koloniajn popolojn por povi silentigi sian propran. Kiam Britio perdos la koloniojn, tiam vi havos la okazon vidi la britan demokration en sia reala nudeco. La koloniaj popoloj jam ekmovigis por forskui de siaj ŝultroj la imperialistan demokration kaj transiri al demokratio reala kaj fakta.

La diferenco inter la privata kapitalismo kaj "ŝtata", kiel vi diras, povas esti simile demonstrata; la privata kapitalismo unuavice servas al militinstigantoj, ĉar militoj estas por gi unuaranga profitfonto. La ŝtata kapitalismo, mi devas korektigi vin: temas pri kolektiva financa mastrumado, tiu ne donas profiton senlaboran al unuopuloj, sed kontribuas al pli bona vivo de ĉiuj laboruloj. Ankaŭ tio estas jam konata al la plimulto de la homoj en la mondo, kiuj ne memvole fermas la okulojn kaj orelojn malantaŭ sia polvigita "fera kurteno." Bonvolu tion publiki en "HEROLDO" kaj mi estas preta prezenti al niaj legantoj vian respondon.

Rudolf BURDA.

## PUBLIKA LETERO AL A. EDEN PRI LA SITUACIO EN VIETNAMO

Hanoi, la 24. II. /Sov. presagentejo/ La jurnalo "NHAN DAN" aperigis publikan leteron al la brita ministropreziданto Anthony EDEN, kiu estis unu el la prezidintoj dum la Geneva Konferenco, rilatinta la problemon de Indoĉinio en la jaro 1954. En tiu letero oni interalie diras:

"Antaŭ nelonge venis el Londono raportoj, laŭ kiuj "Via registaro opinias, ke dum la nunaj regimoj kiel en Norda- tiel en Suda Vietnamo estos malfacile efektivigi generalan liberan baloton". Tiu ĉi vidpunkto ege mirigis la vietnaman popolon.

Se vi atente trastudus la leĝojn rilate generalan baloton, akceptitajn de la Vietnama Dem. Respubliko kaj komparus tiujn kun la pribalotaj leĝoj de Ngo Dinh Diem, vi ĉesus egaligi la regimon de Nordo kun tiu de la Sudo.

Por ke oni povu certigi en kiu parto de la lando regas demokrata libereco, ĉu en norda - ĉu en suda, ni proponas: ke la oficejoj de Ngo Dinh Diem elsendu al la Vietnama Demokrata Respubliko nelimigitan nombron da siaj reprezentantoj. La popolo kaj registaro de V.D.R. al ili garantias kompletan sekurecon kaj liberan rajton agiti por por generala libera baloto. Ni prezentas sole unu kondiĉon: ke la oficejoj de Ngo Dinh Diem garantiu la samajn rajtojn al reprezentantoj de la Vietnama Dem. Respubliko.

Fine de la letero oni diras:

"Se vi oficiale tiun ĉi proponon akceptos, vi per tio kontribuos al la solvo de la "Vietnama problemo".

## BOMBOJ SUR MALAJION

Singapur, 24. 2. 56. /Ĉeĥosl. presagent./ Kiel evidentiĝas el raportoj de la korespondanto de REUTER-agentejo plifortiĝis dum la lastaj tagoj la britaj, aŭstralaj kaj novzelandaj trupoj en Malajio siajn militajn operaciojn kontraŭ la anoj de la nacia liberiga movado.

La 21. de febr. aranĝis britaj, aŭstralaj kaj novzelandaj bombaviadiloj koncentrigitan atakon je regiono de la princlando Djohor - kie laŭ ilia imago troviĝis la tendaro de la "ribeloj". La 23. de febr. aŭstralaj aviadiloj de tipo "Lincoln" superŝutis la ĉirkaŭaĵon de Kuala Lumpuru per 20 tunoj da bomboj. Post la atako

trupoj senditaj en la bombitan regionon,trovis tiu hommalplenan.

KAMPANJO POR SENARMIGO EN HINDIO

Delhi,24.2./Sov.pres gentejo/
Responde al la alvoko de la Tuthindia Packonsilantaro,kę estu de la 1.-14.de febr.arangota kampanjo por senarmigo,okazis en diversaj urboj de Hindio demonstracioj kaj kunvenoj,kiujn ĉeestis reprezentantoj de la Tuthindia Sindikato,Tuthindia Ligo de Kamparanoj,Hindia Virina Federacio kaj aliaj amasorganizoj. Al la kampanjo por senarmigo ankaŭ aligis eminentaj publikaj laborantoj,politikistoj,kiel ekz. la ĉefministro de la ŝtato,Radjastan Mohanlal Sukhadia,la prezidanto de la registaro de Kaŝmir G.M.Bakŝi,hinda deputito Ramanand Tirtha,la prezidanto de la Societo de hindaj industriistoj morarji Valdja,la prezidanto de la Hinda Asocio de Kuracistoj A. Ukil k.aliaj.

KUN GRANDA SOIFO MI TRALEGIS

Por ke niaj legantoj sciu taksi la altan valoron de nia organo,ni prezentas ĉi sube leteron,ricevitan de k-do.el Estona Sov.Respubliko:

Kilingi-Nomme 12/II.
1956.

Karaj gekamaradoj!
Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis unuajn ekz-ojn de via gazeto"LA PACDEFENDANTO",kies vicojn mi tralegis kun granda soifo,ĉar mi jam multajn jarojn ne vidis freŝan Esp-literaturon.Mi ricevis gin en Tallinn de k-dino. Hilda DREZEN kaj nun mi hejme kun mia filino kaj filo legas denove kaj denove.
Mi tralegis artikolon de k-do. Burda en oktobra numero de "La Pacdefendanto"kaj gratulas lin pro veraj vortoj.Jes,ni ankoraŭ ne havas en Sovjet-Unio nian organizitan Esp-movadon,krom la lastaj signaloj - la freŝa vento - Gek-doj,mi salutas vin kaj deziras plej varme sukceson al via valora laboro.
Mi venas al viaj vicoj kaj certe kun mi ankoraŭ dekoj da malnovaj kaj eĉ maljunaj gesamideanoj,sed ankaŭ centoj da novaj kaj junaj pioniroj.
Mi eklernis Esperanton en 1927, kiam liberigis el malliberejoj batalintoj kontraŭ estonaj burgoj kaj kies unua devo estis, reorganizi la laboristan movadon. Ĉe laborista klubo oni arangis Esp-rondon.Tiam mi aligis laboristan movadon sub gvido de la komunista partio.
Mi estas 45jara laŭ ofico...? /ne legebla/.Dum la jaroj 1941-1945 mi troviĝis en la vicoj de la sovjet-armeo kaj partoprenis la batalojn de komenco ĝis fino de la milito,kiam liberigis nia kara patrolando,la malgranda Estonio kaj granda hejmlando Sovjet Unio.
Certe helpe de via gazeto,kies lastajn 3 n-ojn mi havas,mi trovos kontakton kun en- kaj eksterlandaj gekamaradoj.
Mia 17jara filino jam revas partopreni la Junularan Festivalon en Moskvo 1957 kaj renkonti kun tutmonda feliĉa esp-junularo.
Ankoraŭ foje mi salutas vin,ĉeĥoslovakaj gekamaradoj kaj promesas fari ĉion dependantan de mi por revivigi nian movadon ankaŭ en Estonio.

Arne MUNAK
Pärnu str.63-3,KILINGI-NOMME,
Estonia S.S.R.

/Vidu koresp.anoncon lastpaĝe!/

ESPERANTO EN SIBERIO

Tomsk,la 8.de febr.- Laŭ sciigoj de nia k-do.Arsenio V.POPOV, tiu arangis en urbo Tomsk Esperanto-rondon kaj kurson por komencantoj.Laŭ liaj informoj same okazas en aliaj siberiaj urboj, K-do.A. Popov regule ricevas nian gazeton "L.P."kaj distribuos inter la siberiaj gekamaradoj.
/Vidu lian korespond-anoncon!/

INSTIGU VIAJN INFANOJN !

ke ili rapide ankoraŭ kontribuu al la granda volumaro tutmonda, kiu eldoniĝos en Japanio.La infanoj raportu el sia vivo: travivaĵojn en hejmo,libertempo,lernejo dum militaj,ktp. Se eble akompanu per desegnaĵoj kaj sendu ĉion kun esp-klarigoj/tradukoj/ĝis fino de majo aerpoŝte rekte al: Redakcio HEIBONSYA,No.4,Yonbantyo/Kozimati/Tiyodaku,TOKIO,Japanio.La Orient-./.

eŭropa volumo eldoniĝos jam en aŭgusto.La redakcio bezonas 1.000 kontribuaĵojn nur el Ĉeĥoslovakio.
Jen vi havas okazon praktike uzi Esperanton por servi al via patrio kaj tutmondo.Ne forgesu indiki al ĉiu kontribuaĵo la preciz.adreson kaj aĝon de la infan-aŭtoro. Plej bonajn kontribuaĵojn la redakcio rekompencos per donaco de la volumo enhavanta la kontribuaĵon al la infan-aŭtoro.

AVETIK ISAHAKJAN

la plej granda poeto kaj verkisto en Sovjet-Armenio skribas al nia redakcio jenan leteron:
"Danke mi ricevis de mia estimata amiko Simon Mkrtiĉjan viajn korajn salutojn.Vi dediĉis vin al la tasko de disvastigo de la pacideo, de disvolvigo kaj realigo de amo kaj frateco inter la popoloj.
Mi havas la feliĉan ŝancon pere de via organo"La Pacdefendanto" saluti la pacamantajn amikojn de la honestaj popoloj de Ĉeĥoslovakio.
La armena popolo estas malnova popolo,kiu havas multcentjaran kulturon; estas ĝia vivsperto,ke kia ajn malbonaĵojn kaj malfeliĉegojn ĝi spertis,ĉiuj rezultis de militoj kaj precipe de ĉionruinigintaj kunpuŝiĝoj de grandaj potencoj. Sekve,la armena popolo estas amika al tiuj popoloj,kiuj amas kaj defendas la pacon.La armena popolo vidas sian estontan feliĉon en tutmonda frateco kaj paco kaj ĝi fariĝis,rezulte de sia historio,sinoferema kaj sincera soldato de paco.
Kiel filo de tiu popolo,mi staras kun ĝi sub la standardo de la paca armeo.
Akceptu miajn elkorajn deziregojn por la sukceso kaj venko de via granda afero!
Sindoneme via Avetik ISAHAKJAN

EL LA SEKCIO DE MEM EN VIETNAMO

Nia Esp-movado malrapide iras antaŭen,sed estas plena da espero. En Hanoi fondiĝis MEM-sekcio kun 12 gek-doj.Okaze de la 10a datreveno de la Vietnama Dem.Resp.ni eldonis poŝtkarton kun Esp-lingva teksto.Salutleteron ni sendis al k-do Wilhelm Pieck okaze de lia 80a jubileo kaj petis lin,utiligi Esp-on por internaciaj rilatoj.Ni sukcesis interesiĝi pri Esp-o gestudentojn de du gravaj liceoj.Baldaŭ tie malfermiĝos kursoj.Febre ni nun verkas Esp-lernolibron por povi per ĝi varbi amase kunlaborantojn.
Por helpi al nia organiza laboro ni petas,sendi kaj havigi al ni ĉiujn al vi konataĵn adresojn de esp-istoj/novaj k.malnovajn/eble el ĉiuj jarlibroj,de Sudazio,precipe el Hindio,Ĉinio kaj Sudvietnamo,por ke ni povu ligi kun ili kontakton.Ni ankaŭ urge bezonas Esp-lernolibrojn k. ŝlosilojn en franca lingvo por vietnamaj intelektuloj kaj materialon por arangi efikan ekspozicion.
Nguyen-Van-KINH
2 Ly Thuong Kiêt,HANOI,Vietnam.

NOVLUNJARA FESTO
/12.2.56/

Kiom ĝoja ĉi festo de nova lunjaro
Ni entuziasme kantas man-en-mano
Sub ĉielo sendependeca, libera,
En ĉefurbo kun Onklo Ho +/respektinda.
Matene,kiel vespere ni diligente lernas,
Ĉiam atenteme tion,kion li konsilas.
- - - - - -
Ni ĝojas,sed neniam ni forgesas:
Tan-lap,Huong-dien++/,masakroj krias!
Venĝon kontraŭ usonaj-diem'aj barbaruloj!
Kiuj masakris ĉiujn,de junuloj ĝis maljunuloj.
Ni korstreĉite pensas al sudaj amikoj,
kiuj suferas pro mizero kaj teroro en mallumaj tagoj
Ĉi tie ni daŭrigas la lernadon
Solidarece konstruante la pacon,
Ni partoprenu aktive al la batalo
por la triumfo de la sudnorda reunuiĝo!

Viet-HUONG/8jara k-ino/

+/prezid.de Dem.Vietnamo,Ho-Chi-Minh
++/ vilaĝoj en Sudvietnamo.

Supran poemon,kiu per sia profunda senco esprimitan de vietnama infaneto devas emocii ĉiun pacamanton,tradukis liberstile nia k-do N.V.Kinh. Geknaboj el ĉiuj landoj korespondu kun la eta k-dino 8jara Viet-Huong por interŝ.il.p.k.kaj desegnaĵojn.Adreso:Viet-HUONG ĉe N.V.KINH,2 Ly Thuong Kiêt,HANOI.

VIETNAMAN PORPACAN LITERATURON
petu senpage ĉe:MINISTERIO de KULTURO,Bo Van-Hoa, HANOI,Vietnamo.
Ekzistas franca,angla kaj germana sed petu ankaŭ esperantan eldonon!

## NIA MOVADO EN ČEĤOSLOVAKIO

BRNO, fondigis rondeto če la entrepreno de industr.konstruajoj. Ĝia adreso estas: Sekcio de esperantistaj pacdefendantoj če uzina klubo de ROH, Průmstav, BRNO. Nia rondeto jam havas 22 anojn. Baldaŭ aligos ankaŭ la membroj de la likvidita Esp-rondeto de tramistoj. La klubestraro disponigis al ni kelkcent kronojn por niaj kulturaj celoj. Regulaj kunvenoj estas čiu merkrede de 17a horo en luksa kaj agrabla kunvenejo de la uzina klubo, Josefská str.n-o.16.

BRATISLAVA, en la Soldata Lernejo "Jan Žižka" sukcesis k-do.B.Kotek kaj k-dino Kovačičová starigi sol-datan-studentan Esp-rondeton kaj esperas, ke gi bone progresos.

JAKARTOVICE, funkcias kurso kun 12 lernantoj, inter ili 3 junaj instruistinoj. Čiuj jam korespondas eksterlanden kaj abonis Esp-gazetojn. La kurson gvidas lernejdirektoro J.Hadámek.

PODĚBRADY, finigis la unua kurso. Restis 10 lernantoj. la 21.ni aranĝos novan kurson. Instruas k-do Fr.Pytloun kaj insp.Nozar. Ni sukcesis instaligi Esp-ekspozicion en granda elmontra fenestro en Jungmanova str. Grandaj afišoj diversloke varbas por nova kurso, unu el ili sur frekv...oko en staci-domo. K-do.Pytloun varbis 4 novajn abonantojn el sia kurso por "La Pacdefendanto.

LIBEREC, nia klubo aligis kiel rondeto al la Regiona Kultura Domo, kie gi guas idean k.materialan subtenon. Ni ricevis propran kunvenejon, kie ni regule kunvenas čiu merkrede de 20a horo. Funkcias kurso por komencantoj. En proksima jarkunveno ni preparos planon por pliviglig nian agadon. La rondeto estas membro de la Regiona Packomitato. Nia adreso: Kraj.Dům Osvěty Esperantský kroužek, Leninova tř.4 Museum, LIBEREC-I.

PLZEN, la 3/3.estis niaj reprezentantoj invititaj al Regiona kunvenc de čsl.pacdefendantoj, kiun čeestis reprezentantoj el multaj organizoj de la regiono Plzeň./č. 200 personoj/. La programo konsistis el čefa raporto de k-do.Dolejší, pri la progresoj de la internacia pacmovado, minacoj de milit-provokantoj kaj [illegible] si[illegible]

kaj sekur gi gin. En la nomo de "MEM" parolis k-do.d-ro.J.Cerný kaj R.Burda. Ambaŭ prezentis la aktivan laboron de esp-pacdefendantoj kaj faris bonegan impreson inter la čeestantoj, sen varbi per unu vorto por Esp-o. La sekretario de la episkopo de Eklezio Čeĥoslovaka afable donis al ni prelegitan salutleteron de sia episkopo por publiki gin en Esp-gazetoj. Csl.majoro, prelegita pri efika širmado kontraŭ radiado de atomenergio, promesis skribi detalan raporton por Esp-gazetoj. La salutleteron de la episkopo ni publikas en či n-o. La kontraŭ atomdefendan ni havos veršajne por la venonta eldono. Funkcias kurso kun 10 lernantoj. Estas la 6a leciono kaj čiuj kun intereso partoprenas. Post fino ili certe farigos membroj de nia rondeto.

PRAHA, pro vintraj vagancoj de studentoj la junular-kunvenoj estis malfortaj. La 9/12.okazis priliteratura kunveno kun s-ano.d-ro.Tom. Pumpr, kie oni diskutis pri traduka arto en poezio, prozo kaj muziko. La 13.malfermis k-do.Novotný kurson por blinduloj, kiun partoprenas ankaŭ 7 studentoj/vidantaj/ en la Blindula Instituto de Praha.

SKORONICE, en nia vilago estas nur 2 esp-istoj, en urbo Kyjov eble 3, sed tiuj estas nur filatelistoj. En apuda urbeto Vracov ankaŭ estas 1 esp-isto tre aktiva, kiu intencas fondi rondeton. Baldaŭ ni kunvenos en Kijov por prepari laborplanon. Ni klopodos varbi por Esp-o ankaŭ en la apudaj vilagoj.

PODĚBRADY, en febr.n-o.estis erare publikita nia raporto sub urbo Pardubice. Bonvolu tion korektigi!

KARVINÁ, či tie okazis la 11.de marto en la Kultura Domo laborkunveno de la regionoj Ostrava kaj Olomouc. Detalan raporton ni publikos venonte

KOPŘIVNICE, malfermigos kurso por komencantoj. Aligis jam 15 interesuloj. Instruas k-do.Sattek el Příbor Post la kurso lernas progresintoj. La uzina klubo donis 200.-Kčs por tiu či kurso. Uzina gazeto "TATROVÁK" aperigis 2 raportojn pri Esperanto.

PÍSEK, de la 16-29.marto okazas Esp-ekspozicio en la ekspozicia halo de la "DO"-teatro. La rondeto ricevis tion [illegible]

## K O R E S P O N D I   D E Z I R A S :

K-dino.Helena HRUDKOVÁ,Krupinská Cesta 1157,ZVOLEN,Slov.Čehoslovak. /28j.oficistino/kun gek-doj.čefe el Popoldemokratioj;Sovjetio,Bulgario,Polio,Činio,Vietnamo,Albanio Respondo garantiita.

K-do.Jan ŠKUDERA,Dukelské nám.27, PLZEŇ,Čehoslovakio,kun Svisio,Austrio,Okc.Germanio,Okc.Berlino, Brit.Kolonioj,U.S.A.,Jugoslavio, Hungario ktp.Interš.novajn k.uzitajn p.m.kaj fil.afr.aerleterojn.

K-do.Josef SLADKÝ,Výhledy č.54, HOLÝŠOV,Čehoslovakio,per let.kaj il.p.k. Interšangas Esp-glumarkojn kun čiuj landoj.

K-do.Bohumír BĚLUNEK,OUSPZ č.11, OSTRAVA-Hrabůvka,Čehoslovakio,interšangas il.p.k.kaj p.m.kun č.l.

K-do.Miroslav MELICHAR,Dukelské nám.č.8,PLZEŇ,Čehoslovakio,interšangas kun č.landoj il.p.k.fotojn, p.m.kaj gazetojn.

K-do.Josef LOKAJ,POCINOVICE č.147 u Klatov,Čehoslovakio,per il.p.k. kaj interš.p.m.kun čiuj landoj.

K-do.Peter Aleksiev KANTARSKI,Str. "Neofit RILSKI"18,RUSE,Bulgario, pri sporto,kino,popola vivo.Interšangas il.p.k.kun č.landoj.

K-do.Julio CSAPO,Kinizsi str.66, SATU-MARE,Rumana Popola Respubliko deziras ricevi čiuspecajn esperantajojn por propaganda celo.

ESPERANTO-RONDO,ĉe Liceo Nu Trung Hoc,Trung-vuong,HANOI,Vietnamo, kun la tuta mondo per il.p.k.

K-do.Mihail V.BATANOV,/59j./ Str. 199 No.32,TOLBUCHIN,Bulgario,kun čiuj landoj pri č.temoj.Interšangas il.p.k.

K-do.Chu Yung-Shing,542 kung Ho - Hsin Road,SHANGHAI,Činio,kun tutmondo.Interš.librojn,gaz.,il.p.k.

K-do.Václav MILER,KRALOVICE č.29 u Rakovníka,Čehoslovakio,/22j./, kun la tuta mondo pri čiuj temoj. Interš.il.p.kartojn kaj leterojn.

K-do.Georgo PEŠEK,Kotkova 3,PLZEŇ Čehoslovakio,pri agrikulturo,botanismo,gardenarkitekturo k.a.temoj Interšangas fotojn.Nepre respond.

K-do.Pešo Minkov BANČEV,Trojanska V.BORIMA,Bulgario,kun č.landoj.

K-dino.Marie KOHOMOVÁ,Dukelská tř č.26/II.PLZEŇ,Čehoslovakio,per il. p.k.kun čiuj landoj.

K-do.Arsenio V.POPOV,per.Plechanova 24,TOMSK,Siberio,Sovj.Unio, serčas korespond.por siaj kursanoj

K-do.Arne MUNAK,Pärnu str.63-3, KILINGI-NOMME,Estonia S.S.R. kun jun.filatelistoj por interšangi bildkartojn kaj p.m.

ESPERANTO RONDETO,nove fondita, kun 63 entuzismaj lernantoj,arangos meze de aprilo letervesperon. Helpu kuragigi ilin per multaj salutleteroj! Adreso:k-do.Kazimierz, Maly Rynek 11/1,OPOLE,Polio.

K-do.B.KOTEK sciigas al siaj kor. sian novan adreson:Žižkovec J.B. KOTEK,P S 38/P/6,BRATISLAVA-pošt. schr.2017,Čehoslovakio.

## M U N I C I O   P O R   N I A   B A T A L O

| | | | |
|---|---|---|---|
| K-do.ing.Guttmann-Běhánky.... | 30.-Kčs | K-do.A.Kulla-Martin........ | 4.-Kčs |
| K-do.J.Rozbroj-Dol.Suchá..... | 4.-" | K-do.J.Lokšan-Děčín........ | 4.-" |
| K-do.J.Hudec-Liberec......... | 4.-" | K-do.J.Daron-Kunčice....... | 4.-" |
| K-do.K.Krebes-Dol.Jiřetín.... | 12.-" | K-do.V.Hejda-Strašecí...... | 4.-" |
| K-do.K.Majtner-Ostrava....... | 1.-" | K-do.C.Slechta-Praha....... | 8.-" |
| K-do.R.Tomiczek-Karviná...... | 10.-" | K-do.D.Zubek-Karviná....... | 4.-" |
| K-do.A.Odehnal-Karviná....... | 4.-" | K-do.F.Kubasiak-Karviná.... | 4.-" |
| K-do.E.Gold-Karviná.......... | 4.-" | K-do.A.Macek,kanoniko,Mikul. | 10.-" |
| K-do.J.Sedlák-Perín.......... | 6.-" | K-do.L.Bína-Zruč n/Sáz..... | 4.-" |
| K-do.B.Horák-Přerov.......... | 2.-" | K-do.R.Hošek-Struhy........ | 4.-" |
| K-do.J.Rind-Batňovice........ | 5.-" | K-do.D-ro.V.Mohapl-Olomouc. | 5.-" |
| K-do.M.Hromas-Hradec Králové. | 8.-" | K-do.J.David-Hlad.Životice. | 8.-" |
| K-dino.B.Dyčková-Bochoř...... | 4.-" | K-do.J.Ballay-Brno......... | 4.-" |
| K-do.B.Šottek-Dětmanovice.... | 4.-" | K-do.M.Jíra-Jablonec n/Nis. | 3.-" |
| K-dino.J.Míčcová-Praha....... | 14.-" | K-do.V.Wertner-Mlýny....... | 4.-" |
| K-do.J.Chomcc-Mladá Boleslav. | 8.-" | K-do.V.Vantuch-Ostrava-Hulv. | 4.-" |
| K-do.K.Bělohradský-Cheb...... | 11.-" | K-do.F.Černý-Brno-Černovice | 7.-" |

Eldonis: OKRESNÍ VÝBOR OBRÁNCů MÍRU- MIKULOV -odbor esperantistů
Redaktis: K-do.Rudolf BURDA,Palackého n.6,PLZEŇ, ČEHOSLOVAKIO.